

PREZIDANTA BULTENO

Universala Medicina Esperanto-Asocio | Fondita 1908 | Aliĝinta al UEA



Jubileo de Medicina Internacia Revuo (MIR): 100 jarojn!

La jubilea eldono de nia medicinŝcienciga ĵurnalo, Medicina Internacia Revuo, sukcese aperis. Ĝi enhavis 1 artikolon rekte verkita en Esperanto. La prezidanto de UMEA kaj la redaktaro de MIR ne laciĝas rimarki, ke la kvanto de Esperanto-artikoloj estas certe plibonigenda. Ĉiu, kiu renkontas interesan kazon de malsano ĉe paciento aŭ havas instruan medicinan bildon, nepre sendu artikolon pri ĝi en Esperanto al MIR.

Eŭropa Esperanto-Kongreso: Temo paco!



Estas antaŭanoncita la Eŭropa Esperanto-Kongreso kun grava temo: dialogo inter eŭropaj popoloj, paca vektoro. Pli detalaj informoj pri ĝi estas alkröcita al la retletero, per kiu tiu ĉi bulteno estas dissendita.

Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo aktivas

La Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo (BMEF) planas aranĝi virtualan, printempo-salutantan kunvenon la unuan merkredon (la 6-an) de marto, 2024. Tiam estos la 55-a naskiĝdatreveno de la prestiĝa fakgrupeto. Post la 24-a de februaro 2024, do post la komenciĝo de la 3-a jaro de la terura kaj tute sensenca rusa-ukraina milito BMEF intencas skribi pri la tri-lingvaj interpretistoj/tradukhelpiloj al ĉiuj UEA-delegitoj de Estonio, Irlando, Islando, Latvio, Litovio, Norvegio kaj Slovenio, esperante, ke sukcesos aperi ankoraŭ kelkajn versiojn sur la retejo de UEA. Post la fino de la milito BMEF provos krei jam nur du-lingvajn (ekzemple litovan-esperantan, irlandan-esperantan, vjetnaman-esperantan, ktp., ktp.) versiojn.

Jen ligilo al la jam pretaj tekstoj:
<http://umea.fontoj.net/projektoj/>

Forpasis nia Honora Prezidanto D-ro Imre Ferenczy (1932-2023)

Forpaso

**D-ro Ferenczy Imre
(25.07.1932 – 01.09.2023)**

Forpasis la 1-an de septembro 2023, en Győr, en la aĝo de 91 jaroj, la hungara fervojista kuracisto D-ro Ferenczy Imre. Li naskiĝis la 25-an de julio 1932. De 1950 li okupiĝis pri Esperanto, do sindediĉanta al la lingvo dum 73 jaroj. Li estis konsiderata la plej maljuna aktiva hungara esperantisto kaj partoprenis en ĉirkaŭ 40 Universaliaj Kongresoj.

Aktiva pri Esperanto ekde 1950, kiam li estis 18-jaraĝa, jam en 1955 li kunfondis Hungarlandan Esperanto-Konsilantaron. Ĉis 1960 li prezidis la junularan fakon de Hungara Esperanto-Asocio (HEA) kaj de 1962 ĝis 1970 li estis junulara gvidanto de Internacia Fervojista Esperantista Federacio (IFEFF). Li estis fondinto kaj prezidanto de la hungara sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj (ILERA) kaj de la hungara sekcio de la Internacia Fervojista Radio-amatora Asocio. Lia voksigno estis HA1UD. Pro instigo lia, ekde 1982 funkcias radioamatora stacio kun speciala voksigno en la IFEFF-kongresoj.

D-ro Ferenczy diplomigis en la Universitato de Szeged kaj poste en la Universitato de Medicinaj Sciencoj en Budapeŝto, akirante ĝeneralan medicinan diplomon en 1957, 25-jaraĝa. Li laboris pri interna medicino en la hospitalo Parádúrdő inter 1957 kaj 1960, kaj poste li translokiĝis al la MÁV-hos-



pitalo en Pécel por unu jaro. Inter 1961 kaj 1998, li laboris kiel la ĉefoperacisto de la fervoja nodo Győr. Li ankaŭ aktivis kiel sportkuracisto kaj zorgis pri sama futbala teamo, futbal-grupo Győri MÁV DAC (nun Integral DAC), 43 jarojn sen interrompo (1963-2006). Pro tio li ricevis diplomon kiel „Hungara rekordulo”.

En 1970 li iĝis privata sekretario de D-ro Hideo Shinoda. Inter 1977 kaj 2000 li estis la gvidanto de la medicina fakkomisiono de HEA. Ekde 1985 li longtempe okupis la postenon de prezidanto de Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA) kaj samtempe estis membro de la redaktantaro de *Medicina Internacia Revuo* (MIR), la organo de UMEA. En Varno (Bulgario)

dum la 63-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), en 1978, li ricevis la Premion Shinoda de UMEA pro sia elstara medicinmovada agado. En 2007 en Budapeŝto ĉe la Medicina Universitato Semmelweis li ricevis la jubilean oran diplomon pro sia 50-jara kuracista agado, en 2017 li ricevis la diamantan diplomon kaj en 2022 la feran diplomon.

Li aŭtoris du verkojn, *Esperanta Medicina Vortaro* (2009) kaj *Mi estis fervojista kuracisto* (2012). Li modelde kunlaboris kadre de la Faka Agado de UEA kiel reprezentanto de UMEA kaj aparte pri la kunlaboro inter Fakaj Asocioj (UMEA kaj IFEFF). Kiel reprezentanto de UMEA li partoprenis tre multajn Universaliajn Kongresojn ekde la jaro 1973. Krom en eŭropaj landoj li estis en Kubo, Korcio, Kanado, Aŭstralio, Israelo, Brazilo, Ĉinio kaj Japanio. Medicinan studvojaĝon li faris en Usono en la jaro 1998. Seninterrompe dum tridek jaroj, inter 1983 kaj 2013, li estis membro de la Komitato de UEA, kiel reprezentanto de UMEA.

Li estis nomumita Honora Membro de HEA (1994) kaj Honora Membro de UEA (2003). Li estis Honora Prezidanto de UMEA.

UEA kaj ĝia aliĝinta faka asocio UMEA kondolencas la parencojn, kunlaborantojn kaj amikojn. Vivo tia, plena je sindediĉo al Esperanto kaj diversaj fakoj de la homaro, estu por ĉiu esperantisto inspiro.

(El GK de UEA: uea.org/gk/1124a1)

Tiu nekrologo aperis en la eldono de oktobro 2023 de Revuo Esperanto. Jen pliaj informoj sur la paĝoj de la Hungaria Esperanto-Asocio:

<https://esperantohea.hu/forpasis-ferenczy-imre-honora-membro-de-uea>

Ni perdas ege meritplenan, atestimatan, admiratan mentoron, samideanon, amikon kaj modelan Esperantiston, kiu ĝis la lasta minuto aktivis por nia faka asocio kaj Esperanto ĝenerale. La morto de Imre estas grava frapo por nia asocio kaj li certe mankos al ni.

Jen foto de la funebro:



Medicina Disertacio en Esperanto

Ĉu vi scias, ke eblas verki medicinan disertacion en Esperanto? Povas okazi pere de kunlaboro inter la universitatoj en Krakovo, Pollando, kaj en Majenco, Germanio. Ĝis nun neniu kaptis la okazon. Se vi interesiĝas pri la ebleco, kontaktu UMEA.

La venonta IMEK okazos en Kaŭno, Litovio, en la jaro 2025

Laŭ enkonduka interkonsento de reprezentantino de Medicina Universitato en Kaŭno, kiu estis en Krakovo ĉi-jare, la 23-a IMEK ebligos kunorganizi litovaj sciencistoj en la jaro 2025. En tiu ĉi jaro en aprilo aŭ en majo profesoro Opoka, ĉefa motoro kaj organizanto de IMEK-oj, planas veturi al Kaŭno (Litovio) por oficiale interkonsenti pri organizado de nia sekvonta renkontiĝo de sciencistoj-medicinistoj el diversaj landoj dum la 23-a IMEK.

Raportoj de la Landaj Delegitoj

Katarina Faragó, Hungario

„Nova informo pri Yumeiho®: la prezidanto de la internacia Yumeiho®-Centro (Tokio), Hisayuki Ozaki, majstro de la 7-a dan, partoprenos en urbo Hódmezővásárhely en Internacia Yumeiho®-Konferenco, praktikado, ekde 16-a ĝis 21-a de marto 2024, organizata por 4-a, 5-a kaj 6-a dan terapeŭtoj, instruistoj el diversaj landoj („dan“: jap. por grado, rango en ia arto laŭ difinitaj kriterioj). Dum la konferenco li vizitos ankoraŭ regionan bibliotekon „Somogyi” en urbo Szeged, kie li rigardos japanajn kaj esperantajn specialajn kolektaĵojn antaŭ sia hejmenveturo. Li renkontigos en ĉefurbo Budapeŝt kun Yumeiho® terapeŭtoj, instruistoj. La konferencon organizas s-ino Katarina Faragó, 6-a dan Yumeiho®-terapeŭto, Hungarlanda Delegito de Internacia Yumeiho®-Centro. Venos reprezentantoj ekz. el Bulgario, Romanio, Britujo, Macedonio, Pollando, Svislando kaj Nederlando. Por aktualaj informoj bv. de tempo al tempo konsulti la retejon www.yumeiho.hu.”

Elvis Hakizumwami, Demokratia Respubliko Kongo

„Karaj samideanoj, jen longa tempo ke mi silentis, tio estis pro manko de tempo. Nia akademia studjaro plilongiĝis pro la KOVIM-19 epidemio kaj pro la malofta ĉeesto de grandaj profesoroj, kiuj vivas eksterlande. Ni estas devigata respekti iliajn laborplanojn. Sed feliĉe, tiu studjaro alproksimiĝas al la fino. Pri la sansituacio en nia regiono de Goma, ni ĉeestas la (re)aperon de la epidemio de morbilo, precipe en la rifuĝejoj, kie vivas rifuĝintoj, kiuj fuĝas de militoj de ribeluloj M23 ĉirkaŭ la urbo Goma. Feliĉe, dank’ al la organizo MSF, oni jam komencis vakcini la infanojn. Alia epidemio, kiu ŝajnas esti eĉ plu danĝera, estas tiu de la simia variolo. Estas epidemio, kiu atakas ankaŭ bestojn (simiojn) kaj estas transmissiita de bestoj al homoj. Estas pro tio, ke oni malpermesas manĝi viandon el la arbaro al homoj, kiuj vivas proksime de la nacia parko. Hodiaŭ la najbara provinco de Nord-Kivuo jam estas minacata de la tiurilata epidemio. Oni registris almenaŭ pli ol 50 personoj, kiuj malsaniĝis. Tiu malsano atakas la homan haŭton. Ni observas ankoraŭ hontindan fenomenon en la rifuĝejoj ĉirkaŭ la urbo Goma. La virinoj estas ĉiuforte seksperfortitaj kaj pro tio okazas la disvastiĝo de Aidoso en la rifuĝejoj. Eĉ junaj knabinoj kaj maljunulinoj iĝas viktimoj de seksperforto, precipe kiam ili iras serĉi mortajn lignojn por pripari nutraĵojn. Verdire la rifuĝintoj multege suferas. Al ili mankas nutraĵoj kaj plie ili estas viktimoj de krimoj kontraŭ la homaro en la rifuĝejoj kaj neniu intervenas por ilin protekti. Nur la organizo MSF, kiun mi multe gratulas, helpas al tiuj kompatindaj kaj malfeliĉaj homoj en tiuj rifuĝejoj ĉirkaŭ la urbo Goma. Pri miaj studoj: mi komencas la lastan studjaron. Ĝi konsistas el 18 monatoj de staĝoj en malsamaj kuracejoj en la urbo Goma.“

Petr Adam Dohnálek, Ĉeĥujo

Petr raportas: „Okazis granda "striko" de hospitalaj kuracistoj (inter kiuj mi jam persone ne troviĝas). Iom absurdas la vorto, ĉar la kuracistoj minacis, ke ili ekde ĉi tiu Decembro obeos la laborjurajn leĝojn kaj ne plu realigos kromhorojn en amplekso de la leĝaro malpermesita (kio estas ĉi tie realaĵo jam longege, hospitaloj tute ne kapablus funkcii sen tiu kontraŭleĝa laboro ĉar ne havas tiom grandan kvanton da kuracistoj – se laborinspekto vizitas hospitalon, ĝi zorgadas nur pri bagatelaĵoj kaj ĉi tiun ĉefan problemon ignoras). Tamen fine plej granda parto de kuracistoj malaliĝis de la protesto kiam la ĉefministro promesis pligrandigi al tiuj hospitalaj iliajn salajrojn, kvankam la problemoj pri kromhoroj tiel apenaŭ solviĝos. Ili esperas, ke se la kuracista laboro estos pagata pli bone oli tiu de administrataj helpantoj, la hospitaloj estos motivitaj iujn helpantojn por la kuracistoj havigi kaj tiel ilin iom malŝarĝi de tiu skriblaboro. Nun estas la laboro de juna kuracisto kaj de sekretario pagata preskaŭ same, krome ekzemple kuracistinoj ne kapablas el sia salajro post pago de imposto financi infan-vartistinon (kaj nur kelkaj ĉeĥaj hospitaloj provizas infanĝardenon). Ekster grandaj urboj estas granda manko de dentokuracistoj (multaj jam ne laboras en la asekura sistemo) kaj ĝeneralaj infankuracistoj. Ekde la 1950-aj jaroj ĉe ni ne plu ekzistas familiaj kuracistoj, oni devas havi specialiĝon en ĝenerala medicino aŭ por plenkreskuloj aŭ por infanoj. Ekzisto de komuna specialiĝo laŭ mi tre helpus kaj ankaŭ mi havus intereson pri tia laboro, tamen ĉeĥaj infan-kuracistoj (ignorante fakte la realan situacion) dum la lastaj jaroj bojkotis ĉiujn provojn revivigi tiun specialiĝon kun argumentoj ke malkreskus kvalito de la sanzorgo pri infanoj en Ĉeĥujo. Situacio pri kronviruso apenaŭ malsamas de tiu en Germanujo kaj aliaj najbaraj landoj.“

En Germanio estas similaj problemoj. Antaŭ multaj jaroj kromhoroj en hospitaloj estis memkompreneblaj por kuracistoj pro etikaj kialoj - oni pensis, ke kuracisto havas kvazaŭ la devigon oferi sian propran vivon por la pacientoj. Sur tiu sinteno de la kuracistoj baziĝis la tuta laborsistemo. Post juraj kvereloj iam estis decidita, ke hospitaloj devas dokumenti, kiom da laborhoroj la kuracistoj havas. Tiu ofte okazas per horloĝo-maŝinetoj ĉe la enirpordoj de hospitaloj, je kiuj kuracistoj per poŝkarto devas registri sin, kiam ili eniras kaj kiam ili eliras la hospitalon. Depende de la kontrakto kutima labortago ekz. havas 8 horojn, estas permesita labori 10 horojn se estas dokumentitaj kialoj (ekz. neatenditaj prizorgoj de urĝaj kazoj), sed ne plu. Tamen estas tiom da laboro, ke ĝi precipe de junaj gekolegoj, kiuj ankoraŭ ne estas tre spertaj, ne povas esti farita ene de tiuj 10 horoj. Sed se ili laboras pro nura idealismo kaj sindevigo pli longe, tempo-komisiitoj en la diversaj departementoj ofte simple forstrekas la kromajn horojn laŭ la ordono de la administracio de la hospitaloj. Kompreneble la administracioj ne pretas pligrandigi la nombron de la dungitoj, ĉar kostas tro da mono. Multaj gekuracistoj ne plu volas aliaflanke en propra praktikejo, ĉar la administraciaj baroj estas tro temporabaj kaj ĝenaj. Infanĝardenoj almenaŭ ekzistas ĉe la plejmulto de germanaj hospitaloj.

Pliaj atentigoj

R.A.R. Zuluaga ankaŭ prezentas:
[EKZERCIO DE VORTOJ
 PRI SENTA SISTEMO](#)
 (Klaku sur la titolo kaj respondu)
 LA HOMA SENTA KAJ
 SENTA SISTEMOJ
<https://www.youtube.com/watch?v=IuO6CxvuYtM>

Li skribas:

„La sensa sistemo esta la pordo por niaj perceptoj kaj nia konscio de la ekzistado propra kaj de aliaj. Tial ĝia priskribo helpas al oni komunikiĝi kun aliaj niajn spertojn kaj suferojn. Koni la korekta vortaro pri tiuj sprimoj kaj ĝia korekta uzo estas grava parto de nia bona interkomunikaĵo ĉiu taga, aŭ en kurcaj interrilatoj kun la respondeculoj pri nia sano, sed ankaŭ dum neantaŭvidebla hazarda malfeliĉo pro akcidento. Vidalvide al la bezono verki instruigan kaj teknikan libron el la vidpunkto de la paciento (por la libro “Konsulti Kuraciston”), aperis la bezono de polurado de bazaj vortoj el la vidpunkto de la difino aŭ de la taŭgeco, nome: Doloro kaj sufero, ĉu ili estas sinonimoj?. Senso kaj sento ĉu samsignifaj vortoj?... Tute ne. Laŭ Anna Lowenstein: “Ĉiu duonbakita duonkomencanto kredas, ke li aŭ ŝi rajtas proponi aldonojn al la vortaro” tio estas fakto kaj risko. Ankaŭ estas demando: Ĉu grekaj kaj latinbazaj scienconomoj en medicina fako aperigas esperantan dialekton?. Ĉu vi konscias ke la esperanta vortofarado eblas generi vortojn asimilitajn, esperantigitajn aŭ laŭ pura esperanta konstruo? Oni trovis diskutindajn vortojn kaj ĉi tiu ateliero pritraktas tiujn rilate la sensa sistemo de la vivestaĵoj, kaj ĝia uzo en medicino.“

Rodrigo A. Ramirez Zuluaga, Kolombio

MEDICINA VERKO EN DISVOLVO

D-ro Rodrigo Ramírez, kolombia esperantisto kaj kuracisto, verkas la libron "Konsulti kuraciston". La verko enhavas rekomendojn por la Esperanta medicina komunumo pri faka uzo de taŭgaj terminoj, cele klarigi al la ĝenerala publiko pri ĝia ĉiutaga uzado, por eviti miskomprenojn en la momento de verkado de teknikaj informoj aŭ artikoloj kaj en la okazo de la uzado de Esperanto fronte al la eblo konsulti kuraciston aŭ sanprofesiulon pere de telemedicino.

Kelkaj el la proponoj estas jenaj:

1- La termino "vivosigno", en la Nova PIV 2020 (NPIV) havas la signifon de "evidentiga pruvo uzata por indiko pri tio, ke oni ankoraŭ vivas (ekz. soldato post milito). Tial ke la taksado kaj mezurado de la bona korpofuncio dum la sukuro bezonas taŭgan vorton por prezenti ĝin kiel donitaĵo al alia sanprofesiulo, oni proponas inkluzivi la terminon "vivofunkcioj" por reprezenti la ĉefajn funkciojn de la organismo kaj "funkcioindikilo" por la bazaj parametroj en la komenca takso de paciento: temperaturo, pulsefrekvenco, sangopremo, spirofrekvenco, sanga oksigena saturado kaj doloro (vidu 1- Prezento de la verko).

2- Konsciiĝu, ke Esperantaj terminoj povas havi malsaman originon kiel: asimilita vorto el aliaj lingvoj, "esperantigita" aŭ pure Esperanta vorto. Ĉi lasta estas preferinda kaj fundamenta. Ankaŭ proponas revizii asimilitajn vortojn kiel : Medikamento, Kardiologio, Neurologio, Stetoskopo, Metabolo, Ortopedio, Homeostato, ktp.

(vidu video 2- parto 2 Sinonimoj)

3- Rimarki la bezonon diferencigi inter: senso kaj sento, emocio kaj sent(iment)o, doloro kaj sufero.

4- Atentigi pri la bezono uzi la vorton "DROGO" kiel difinita vorto por la koncepto laŭ la dua difino de NPIV: Substanco stimula aŭ stuporiga, kiu povas kaŭzi psikan kaj korpan dependecon (ekz. kafo, tabako, alkoholo, kokaino, opio, heroino). Kaj eviti uzi ĝin kiel sinonimo de medikamento, same kiel la unua difino de la vorto en NPIV kun ĝenerala senco "substanco, uzata en kemio kaj farmacio (arkaismo)".

La Hispana versio estas preskaŭ preta, kaj poste oni finos la Esperantan version.

Oni povas trovi pli da informoj pere de Telegram:

invitligilo: t.me/konsultikuraciston

serĉado: @konsultikuraciston

kaj de youtuba kanalo:

RESUMA PREZENTO DE MEDICINA VERKO:
 KONSULTI KURACISTON

<https://www.youtube.com/watch?v=N2rd3x5bKDs>

1- MEDICINAJ parto 1 - PRI VORTAJ STUDIOJ POR VERKO
 "KONSULTI KURACISTON"

<https://www.youtube.com/watch?v=uLKEw9Uv8Ak&t=1s>

2- MEDICINAJ parto 2 - SINONIMOJ- PRI VORTAJ
 STUDIOJ POR VERKO "KONSULTI KURACISTON"

<https://www.youtube.com/watch?v=bIIqhDNKMJQ>